




tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

Internacia
Seminario +



AGO SEMAJNO



= JES
Junulara
E-Semajno



**Komuna
Seminario
en Japanujo**

**Intervjuo kun pro-
gramisto de nova
Pasporta Servo**

**Junulara
Kongreso
en Togo**



Saluton!

Ĉi tiu numero temas ĉefe pri Esperanto-renkontiĝoj: Surprize ankoraŭ venis tre longa raporto pri la pasintjara IJK, pri kiu ĝis nun ne estis raporto. Estas alvoko por aliĝi al la ĉi-jara IJK. Estas raporto pri junulara Esperanto-renkontiĝo en Togo. Pri la

Komuna Seminario estas du kontribuoj: Unu raporto pri la pasinta Komuna Seminario en Japanujo, kaj unu intervjuo pri la historio de la Komunaj Seminarioj. Tre interesa estas ankaŭ la informo pri kuniĝo de IS kaj AS al nova renkontiĝo: Junulara E-Semajno. Detalojn pri tio vi trovas sur la lasta paĝo.

Krom la multaj artikoloj pri renkontiĝoj, ankaŭ estas intervjuo kun la programisto de la nova administra sistemo de Pasporta Servo, Joan CATALÁ.

Kaj finfine mi diru ion pri la alvoko, kiun vi trovas sur la ĉi-dekstra paĝo: Jes, TEJO serĉas novan redaktiston por TEJO Tutmonde, ĉar mi forlasos ĉi tiun

postenon komence de la somero. La ĉefa kialo por mia demisio estas, ke mi iĝos patro komence de Julio, kaj ke tiam estos malfacile por mi bone plenumi la taskon de redaktisto apud mia doktoriĝa laboro kaj mia patreco. Do, se vi interesiĝas pri transpreno de la tasko, kontaktu TEJO-n kiel eble plej baldaŭ.

Ĝuu la legadon!

Marcos

Enhavo

Nova redaktisto por	
TEJO Tutmonde serĉata	3
Intervjuo kun la programisto	
de la nova Pasporta Servo	4-5
Junulara kongreso en Togo	6-7
Komuna Seminario en Japanujo	7-9
Intervjuo pri la	
Komunaj Seminarioj	10-11
Aliĝu al la 65-a IJK en Liberec'!	12-13
Raporto pri la pasinta	
IJK en Hungarujo	13-18
Kontakt-informoj	
kaj informoj pri TEJO	19
JES! IS kaj AS finfine kune!	20
TEJO-aktuale	20

Limdato por 2009:3 – 15-a de Majo 2009!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

*Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Königwinterer Straße 204, 53227 Bonn, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republiki artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.


*Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: officejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***

Nova redaktisto por TEJO Tutmonde serĉata!

Ĉu vi bone regas Esperanton, bone konas la Esperanto-movadon, ŝatas verki kaj redakti, sed ĝis nun ne havis okazon apliki viajn talentojn por la bono de Esperanto? Jen perfekta ŝanco por vi! La nuna redaktisto redaktos TT-on ĝis Junio 2009. Do, ni serĉas novan redaktiston kiu povos eklabori en Junio.

Kandidato por la TT-redaktista posteno havu:

- Bonegan lingvoscipovon
- Profundan konon de la junulara Esperanto-movado specife kaj la Movado ĝenerale
- Kapablon redakti kaj revortumi eĉ la plej malfacilajn (foje burokratecajn) artikolojn/raportojn
- Kapablon instigi/varbi kontribuantojn
- Kapablon kunlabori kun la redaktisto de Kontakto por samtempigi la prespretiĝon de TT kun tiu de Kontakto
- Kapablon mem grafiki/enpaĝigi, aŭ havu helpanton kiu povas tion fari (la nuna redaktisto povas iom helpi al la sekva redaktisto lerni uzi simplan komputilan programon por enpaĝigo, se tiu jam havas sufiĉe da bazaj komputilaj kapabloj)



La redaktisto de TEJO Tutmonde ricevas honorarion de 400 eŭroj jare.

La nova redaktisto eklaboru ekde la mezo de Junio. Por ke la postentransdono povu okazi kiel eble plej senprobleme, la nuna redaktisto planas helpi al la nova redaktisto ĉe lia unua numero (kiu devos esti preta meze de Aŭgusto).

Por informoj pri la redakta laboro mem, kontaktu Marcos CRAMER (tejo-tutmonde@tejo.org).

Por kandidatiĝi sendu viajn vivresumon kaj kandidatiĝan leteron ĝis la fino de Aprilo al la Ĝenerala Sekretario de TEJO – Anna-Laura WICKSTRÖM (gxen-sek@tejo.org)

Ne forgesu rekotizi!

Se vi ankoraŭ ne rekotizis por remembrigi (aŭ repatroniĝi) en TEJO por 2009, faru tion kiel eble plej baldaŭ, por daŭre ricevi *Kontakton* kaj *TEJO Tutmonde*. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuo, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2009 okazos en Ĉehujo)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2009! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

Intervjuo kun la programisto de la nova Pasporta Servo

Joan CATALÁ gajnis la konkurson por programi la novan administran sistemon de Pasporta Servo. TEJO Tutmonde intervjuis lin je la 17-a de Decembro 2008 per tujmesaĝilo.

- Saluton Joan! Rakontu iom pri vi mem: Via vivokupo, aĝo loĝloko ktp.

Mi nomiĝas Joan CATALÁ. Mi estas 30-aĝa komputilisto kaj laboras por mia registraro en Valencilando. Mi loĝas en Benicàssim, malgranda mara urbeto.

- Kiam kaj kiel vi eklernis Esperanton?

Mi ekkonis Esperanton kiam mi loĝis en Barcelono, tiam mi kontaktis esperantistojn el la Kataluna Esperanto-Asocio kaj komencis partopreni en kunvenoj. Mi neniam studis la lingvon mem, nur komencis paroli kaj drinki bierojn kun aliaj samideanoj; kaj iom post iom mia lingvo riĉiĝis.



- Ĉu multaj katalunoj tiel lernas Esperanton, aŭ ĉu vi estis escepto?

Mi ne scias. Ekzistas diversaj tipoj da esperantistoj, ĉu ne? Eble venontjare mi devus fari enketon al katalunoj, hehe.

- Ĉu vi lernis programadon memstare, en universitato aŭ alimaniere?

En Universitato kaj en asocioj. Mi partoprenas en Indymedia de antaŭ sep jaroj kaj mi estis teknikisto en aliaj kolektivoj en mia urbeto. La libroj povas instrui al vi kelkajn aferojn, tamen se vi ne komencas labori antaŭ la komputilojn, vi vere ne havas sperton kaj evoluon. La teknologio kaj program-lingvoj evoluas tagon post tago.

- Per kio vi komencis vian agadon por Esperanto?

Mi aliĝis al la plej proksima asocio (KEJ, la Kataluna Esperanto-Asocio). Sekve, post du jaroj, mi partoprenis en diversaj kongresetoj kaj tiam ni decidis ankaŭ krei VEJ, la Valencian Esperanto-Asocion. Poste mi partoprenis dum 2 jaroj en TEJO.

- Kiumaniere vi jam antaŭe uzis programadajn sciojn por Esperanta agado?

Mi estas la retestro de la paĝaro de ĉiuj katalunaj esperanto-kongresoj, de la paĝaro de KEA kaj KEJ, mi komencis katalunan projekteton nomata Heli-keto.net. Aldone mi kreis KLAKE.net kaj mondakalendaro.org por kunigi la esperantajn blogarojn kaj la esperantajn aranĝojn; mi ankaŭ kunlaboras en la

komunumo de Drupal en Esperanto kaj Debian en Esperanto.

- *Kiuj estas la ĉefaj trajtoj de la nova administra sistemo de Pasporta Servo (PS)?*

Nu, pasintsemajne Joop prenis la taskon de administri Pasportan Servon, kaj nuntempe li okupiĝas pri ordigo de ideoj kaj studado de la datumbazo kun mi. Post kelkaj semajnoj ni komencos adapti ĝin al la paĝaro. La nova PS 2.0 havos pliajn uzantojn (eble tri-foje pli, mi kredas, ol nuntempe).

- *Ĉu per "uzantoj" vi intencas kaj gastigantojn kaj homojn, kiuj serĉas gastigantojn, aŭ nur unu el la du grupoj?*

La gastigantoj estas uzantoj. Ne devas esti diferenco inter uzantoj kiuj havas propran domon kaj uzantoj kiuj ne havas (ekzemple la studentoj). La nova sistemo havas la ideologion de la nunaj sociaj paĝaroj 2.0 kie ĉiuj estas uzantoj kaj ĉiuj parolas, komentas kaj voĉdonas libere. La uzantoj estos egalaj por vojaĝi, opinii en forumoj kaj malaliĝi de la paĝaro se ili ne ŝatas la servon.

- *Do verŝajne la aspekto de la PS-paĝaro ankaŭ multe ŝanĝiĝos, ĉu ne?*

La aspekto jes, sendube. La ideo estos pli riĉa, pli alloga kaj pli moderna. La spirito estos la sama kiel ĉiam: tutmonda gastiga servo pere de la Esperanta lingvo.

- *Por la pli teĥnikemaj el niaj legantoj, ĉu vi povas iom klarigi kiujn teĥnikajn ilojn vi uzas por krei la novan sistemon?*

Per la enhav-administra sistemo Drupalo ni konstruos dinamikan paĝaron kun forumoj (por debatoj, duboj, demandoj en vojaĝoj), kun blogoj (por ke ĉiuj rakontu siajn spertojn dum la vojaĝoj), mapo de Googlemaps por serĉi rapide Esperantistojn el aliaj urboj/landoj kiel faras mondakalendaro.org aŭ Amikumu. La

ideo estas strukturi inteligente la paĝaron por ke ĝi estu kiel retgazeto dinamika; la diferenco estas ke en PS 2.0 la informoj dinamikaj estos redaktataj de la uzantoj mem kaj ne de redaktistoj kiel en retaj gazetoj. Ni uzos PHP-on kaj Ajax por montri datumojn, XHTML/CSS por dezajni allogajn paĝojn, ĉio pere de libera programaro kiun Drupalo ofertas.

- *Kiel estonte estos kreata la libera versio de Pasporta Servo?*

Mmmm, dependas. Mi mem proponas forviŝi la nunajn datumojn de la libro kaj komenci denove pere de la paĝaro, ĉar en unu semajno ĉiuj esperantistoj povus denove aliĝi (fakte mi mem ne aperas en la libro!), sed pro tio ke la libro ne malaperos, unue Joop kaj mi devas studi kiel miksi la nunajn gastigantojn kun la datumbazo kiun mi instalos por la paĝaro, pro tio la fina dato dependos de nia nuna laboro. Tamen, se mi povus komenci la paĝaron hodiaŭ en 30 tagoj mi povus konstrui la paĝaron kiel mi prezentis en la konkurso. Per Drupalo ĉio estas rapide programebla kaj dezajnebla.

- *Ĝis nun la reguloj de Pasporta Servo postulis, ke ĉiu, kiu volas gastigi, devas posedi kopion de la libro. Ĉu estonte estos iu simila limigo, aŭ kiel funkcios?*

Mi ne scias. Pri tio devus opinii TEJO, ĉar PS estas ĝia projekto, tamen laŭ mi presi milojn da libroj enhavantajn la samajn informojn kiel la estonta paĝaro malhelpas la ekonomion de TEJO kaj la ekologion de la planedo, kaj eĉ mi diras ke la paĝaro mem povas krei liston da uzantoj de la servo en PDF-a formato, do kial daŭre presi kaj sendi milojn da librojn? Ĉu tio vere utilas en la nuntempa jarcento?

- *Multan dankon pro la intervjuo!*

Junulara kongreso en Togo

Karaj Geamikoj,

Dum vi legas ĉi tiun mesaĝon kaj rigardas la fotojn, Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE) estis reatinginta hejmon post la Zamenhoffesto kunigita al 16-a Togolanda Esperanto-Kongreso, kiu ĵus okazis sub la temo "Edukado al paco" de la 26-a ĝis la 28-a de decembro 2008 en la urbo Vogan. Konsidere la saĝecon "ĉio bonas, kio bone finiĝas", mi nun povas diri ke la ĉi-jara renkontiĝo de la togolanda junulara sekcio kaj samperiode maljunulara okazis sukcese. Partoprenis en ambaŭ aranĝoj de komence ĝis la fino 74 enlandaj geesperantistoj el kiuj ĉirkaŭ triono havas malpli ol 30 jaroj.

Io nova el la tradicia programo estis la renovigo de la gvidorganoj de la toga movado. Tial, re-elektiĝis en la estro de JOTE: prezidanto SEDJRO Kodjo Moise, vicprezidanto GBEGLO Difa, sekretario EDAH Gadoufio, vicsekretario KOSSIVI



Difa Massan kaj kasistino AMEGADZE Yawa.

La laboro de la nova estraro interalie prioritare koncernos

a) kunlaboron kun TEJO cele al havigo de propra baza retejo por togolanda sekcio ĉe tejo.org;

b) revigligon de enlandaj junulaj geesperantistoj kaj instigon al ili verki por naciaj kaj internaciaj esperanto-gazetoj;

c) publikan elpaŝon en aranĝoj naciaj



kaj internaciaj en Togo ekzemple, fiouroj...

ĉ) kuraĝigon al informado pri Esperanto kaj lingvaj kursoj fare de gejunuloj tra lernejoj, universitatoj ktp.

Notindas ke dum la kongreso en Vogan multaj junulaj aktivuloj donis intervjuojn al loka radio, kiu poste elsendis pri la aranĝo. Okazis diversaj prelegoj flanke

de junulara sekcio, piedpilka ludo dum kiu la kongresa piedpilka teamo superis la lokan teamon per 2 kontraŭ 1.

Alvenis mesaĝoj de eksterlandaj esperantistoj kiuj estis legitaj dum la Zamenhofa festo fare de la membroj de JOTE.

ADJĖ Adjévi, komitatano por JOTE

La 27a Komuna Seminario en Bluĉiela Jokohamo

Komuna Seminario (KS) estas junulara evento inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj, kiu ĉiujare kaj alterne okazas en aziaj tri landoj (Ĉinujo, Japanujo kaj Sud-Koreujo). De la 27a ĝis la 29a de decembro 2008 okazis la 27a Komuna Seminario en Junulara Gastejo de Jokohamo kun la partopreno de 56 homoj, el kiuj 35 estis japanoj, 14 koreoj, po unu el Ĉinujo, Svisujo, Malajzio, Usono kaj Hispanujo kaj du infanoj. La ĉeftemo estis "Ekologio en ĉiutaga vivo".


Ridoj, KS-temkanto kaj iom da seriozeco

Vespere je la 7a horo de la 27a okazis inaŭguro, en kiu kvin studentinoj el Sofia-Universitato en Tokio malfermis ĝin per mesaĝo rilatanta al mediprotekto. Sekvis ĝin salutoj de la prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la prizorganto ktp, kaj sinprezentoj de la partoprenantoj. Poste nova temkanto de KS estis prezentita.

Je la 8a komenciĝis Amika Vespere kaj ludon gvidis Mirejo el Svisujo. Je la 9a okazis Kandela Nokto. La seminariejo estis lumigita per kandeloj, en kiu partoprenantoj duope konversaciis pri siaj

gravaĵoj.

La duan tagon la 28an komence okazis tri aranĝoj. Unu estis Esperanto-kurso. Alia estis fari notlibrojn el uzitaj paperoj. La alia estis "Diskuto pri junulara movado en Azio". Je la 3a posttagmeze okazis grupolaboro kun la ĉeftemo "Ekologio en nia ĉiutaga vivo", Komence ni grupe difinis la vorton "ekologio" kaj prezentis la rezultojn. Kaj poste ni faris "Ekologian Manifeston" en 6 novaj grupoj. Poste ĉiuj grupanoj prezentis sian manifeston al aliaj en aliaj grupoj kaj laste ĉiuj donis du voĉojn al la ŝatataj





manifestoj. La unuan premion gajnis Grupo 2 kun manifesto “Atente, bone pensu” kun siaj simpleco, fundamenteco kaj impona desegno. Dum la du horoj, ni bone pripensis mediprotektadon en ĉiutaga vivo.

Vespere okazis Bankedo en japana restoracio proksime de la seminariejo. Ni manĝis frandaĵojn kaj drinkis senlime.

Nokte okazis reta konferenco kun la partoprenantoj de samtempe okazintaj “Seminario” en Germanujo kaj “Ago-Semajno” en Slovakujo. Pro teknika problemo la komunikado ne glate iris sed la ĉeestantoj povis senti la internacian ligan.

Antaŭtagmeze la 29an okazis Fermo kaj post la tagmanĝo en la najbara parko, ni promenis de la kongresejo tra Jokohamo, la seminaria urbo. La vetero estis ideala kaj ĉiuj ĝuis la promenadon.

Nova Temkanto de KS

Nia nova temkanto de KS nomiĝas “Ĉirkaŭ ni” (Hori Jasuo versis poemon kaj s-ino Tazima Mayuko komponis melodion al ĝi kun la helpo de s-ro Kitagawa Hisasi.) La poemo jene komenciĝas:

Kie estas amikeco? Ĉu en lando en malproksimo? Ne, ne, ne, Ĉirkaŭ ni, kiuj vivas kun amo.

Kaj la dua strofo komenciĝas per “amo” kaj finiĝas per “espero”, la tria per “espero” kaj per “paco” kaj la kvara per “paco” kaj per “amikeco” kaj revenas al la unua strofo. La melodio estas tiel simpla kaj impresa, ke ni ĉiuj tuj memoris kaj ĝoje kantis ĝin.

Nuna situacio de la junulara movado en Azio

Dum la kunsido subaj aferoj estis prezentitaj kaj diskutitaj. Nun funkcias junularaj organizoj en jenaj landoj (jaro de fondiĝo kaj aliĝo al TEJO): Japana Esperanto-Junularo (1992, 1994), Korea Esperanto-Junularo (1958, refondiĝo 1981, 1964), Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (1993, 1993), Vjetnama Junulara Esperantista Organizo (2004, 2005), Nepala Esperantista Junulara Organizaĵo (2004, kandidatiĝis al la landa sekcio de TEJO), Irana Junulara Esperantista Organizo (1993, 1994), Junulara Esperanto-Ligo Israela (1971, 1972).

Bedaŭrinde en aliaj landoj junularaj organizoj ne ekzistas.

S-ro Song resume rimarkigis al ni jenajn ok mankojn en la junulara movado:

1. Komunikado inter aziaj junularoj kaj TEJO
2. Seriozemo pri respondeco
3. Stabileco
4. Datumoj de antaŭaj KS-oj
5. Sufiĉa financo
6. Apartenemo de junuloj al organizoj kaj grupoj
7. Lingve kompetentaj junuloj

Laŭ la statistiko pri la nombroj de la partoprenantoj en la pasintaj KS-oj, ĝis la 11a KS la nombro ĉiam superis 100 (la plej granda estis KS en 1992 en Ĝyeohgju kun 193 partoprenantoj) krom KS-oj okazintaj en Japan-

ujo, tamen en la lastaj 5 jaroj partoprenantoj estis ege malmultaj, ekzemple 18 en Iksan en 2004, 30 en Kamogawa en 2005, 18 en Beijing en 2006 kaj 50 en Iksan en 2007. Tiun tendencon oni ne povas ignori, ĉar junularo estas nia espero, kaj tiu fonto jam estas elĉerpiĝanta.

Solvi tiujn problemojn ne estas facile. Junuloj estas ĝenerale malriĉaj, vizio-problemo ekzistas, studentoj havas nur 4 jarojn por agadi, kaj kiam ili eklaboras, libera tempo mankas al ili. Estas notinde, ke en tia situacio, KAEM decidis subvencion al du partoprenantoj el Vjetnamujo kaj Barato (bedaŭrinde tiu projekto ne realiĝis).

La venonta KS okazos en Ĉinio.

HORI Yasuo (origina versio de la artikolo por revuo *Esperanto*), reviziado de AMANO Yayoi, prezidanto de Japana Esperanto-Junularo



Komuna Seminario, pasinte kaj estonte

Intervjuo kun SONG Ho-Young, la prezidanto de la Korea Esperanto-Junularo

- Kara Ho-young, ĉu vi povus rakonti iom pri la historio de la Komuna Seminario?

Komuna Seminario komenciĝis en 1982, en plena samopinio de koreaj kaj japanaj junuloj, ke iu junulara evento necesas inter ambaŭ landoj najbaraj. Kontraste kun Eŭropo, orientaziaj landoj ne estas bone ligitaj per surteraj veturiloj; Japanujo estas insularo, kaj Sud-Koreujo estas kvazaŭinsulo pro ŝlosisma Nord-Koreujo. Ĉinujo estas tre vasta, kaj aliaj aziaj landoj estas tro foraj. Tial se okazos iu internacia junulara aranĝo en Azio, nenio estis pli taŭga ol tio inter Japanujo kaj Sud-Koreujo.

En 1980, tiama vicprezidanto de TEJO Amri Wandel, kiu poste fariĝis prezidanto de TEJO, vojaĝis al Japanujo, unue kun celo fondi tie Landan Seĵon de TEJO. Li proponis al japanaj gejunuloj komenci komunan projekton en internacia skalo. Tiucele li sinsekve vizitis Sud-Koreujon por renkonti aktivajn fukciulojn de korea junulara movado, interalie s-ron BAK Giwan, kiu en 1981 elektiĝis kiel prezidanto de refondita Korea Esperanto-Junularo (KEJ), kaj ĉefrespondecis pri la 1-a KS.

Per kunlaboro inter japanaj kaj koreaj junuloj, la 1-a Komuna Seminario sukcese okazis sur la monto Sorak, Sud-Koreujo, kun 103 partoprenantoj, kun du temoj: "Por kio estas Esperanto?" kaj "La plej bona maniero de Esperanto-edukado". Kiel oni vidas en statistiko, nombro de partoprenantoj daŭre kreskis kaj proksimume atingis eĉ 200 en la 11-a KS, sed en la komenco de 2000 la nombro serioze

malgrandiĝis eĉ ĝis 18 en la 23-a kaj 25-a KS-oj. Nuntempe partoprenantaro denove montras kreskon.

Ekde la 27-a ĝis la 29-a de decembro 2008, okazis la 27-a KS en Jokohamo, Japanujo, kun 56 partoprenantoj el 7 landoj, kun la ĉefa temo "Ekologio en nia ĉiutaga vivo". Krome partoprenantoj traktis ankaŭ movadan temon "Kio estas necesa por plivigligi junularan movadon en Azio?".

- Laŭ kiu maniero oni decidas, en kiu jaro ĝi okazas en kiu lando kaj en kiu urbo?

KS okazis alterne en Sud-Koreujo kaj Japanujo ĝis 1994. Ĉina Junulara Esperanto-Asocio eniris en la organizantaron de KS ekde 1995, kiam ĉinaj junuloj okazigis la 14-an KS-on en Tienĵin. Do KS nuntempe okazas alterne en Sud-Koreujo, Japanujo kaj Ĉinujo. La decido pri urbo aŭ loko dependas de la tiujara organizanto. Pri datoj, lokoj, temoj kaj aliaj aferoj de ĝisnunaj KS-oj, oni povas trovi ĉe eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_Seminario, aŭ simple per tajpado de "Komuna Seminario" ĉe la Esperanta Vikipedio.

- Kiom longa kutime estas la Komuna Seminario, kaj kiam en la jaro ĝi okazas?

La periodo de KS dependas de decido de organizanto. Ĝi foje okazis kvar tagojn, kaj foje eĉ unu tagon, kiam ĝi okazis paralele kun IJK (la 50-a IJK en Sud-Koreio, kaj la 56-a en Honkongo). Nuntempe ĝi kutime tri tagojn okazas.

Ĝis la 25-a KS en 2006, ĝi okazadis precipe en julio aŭ aŭgusto. Sed tro multas rivalaj Esperanto-eventoj en

somero, kaj pli kaj pli da azianoj partoprenas en UK aŭ IJK, kiu apenaŭ okazas en Azio, tial oni okazigas KS-on jarfine ekde la 26-a fojo. Ankaŭ la 27-a KS okazis preskaŭ tuj post kristnasko.

- *Kiel ĝi estas organizata? Ĉu estas spert-interŝanĝo inter la organizaj teamoj de la diversaj Komunaj Seminarioj?*

Landa junularo respondecas pri la organizado. Antaŭ la fondo de Japana Esperanto-Junularo (fondita en 1992), japanaj junuloj okazigis KS-on kunlabore kun Esperanto-rondoj, sed nuntempe JEJ mem ĉefrespondecas pri tio.

Kiel vi scias, alterniĝo de aktivuloj rapidas en junulara movado, ĉar junuloj devas studi aŭ labori aŭ eĉ militservi en Sud-Koreujo. Pro tio ankoraŭ mankas oportuno interŝanĝi spertojn inter la organizaj teamoj.

- *Kiuj programeroj okazas en ĉiu Komuna Seminario?*

La plej ĉefa programero estas diskuto pri seminario temo. En komenca periodo KS okazis en sufiĉe akademia etoso, kun temoj rilataj al politiko aŭ historio inter ambaŭ landoj. Sed pli kaj pli aldoniĝis ankaŭ amuzaj programeroj allogaj al gejunuloj. Krome ĉeestantoj kutimas havi programerojn por sinprezenti (se nombro de partoprenantoj ne tre grandas.), kanti, danci, aŭ iun ajn prezentaĵon, amikigaj grupludoj, diskuto pri azia junulara movado, diskuto pri la ĉefa temo, prelego(j), bankedo kaj ekskurso.

- *Kiel varias la programo de la diversaj Komunaj Seminarioj?*

La historio de Komuna Seminario estas malpli longa ol tiu de aliaj bone konataj eventoj, kiel IJK aŭ IS. Tial nature programo varias laŭ landoj kaj periodoj, kaj laŭ tendenco de partoprenantoj, krom



La unua Komuna Seminario
en Sud-Koreujo en 1982

kutime fiksitaj programeroj, ekzemple diskuto pri la ĉefa temo.

- *Kion vi planas por la estonteco de la Komuna Seminario?*

Kiel menciite en la kvara respondo, bedaŭrinde oni ne havas oficialan oportunon transdoni scion kaj sperton de antaŭuloj al posteuloj. Foje fortiĝi kaj foje malfortiĝi estus iasence neevitebla sorto de landa junulara movado, do mi kredas, ke absolute gravas bone trovi kaj konservi kaj transdoni antaŭajn kaj nunajn datumojn.

Krome menciinda estas klopodo envicigi pli da ĉinaj junuloj. Bedaŭrinde ili ne multe partoprenas KS-ojn okazantajn en Sud-Koreujo aŭ Japanujo, kvankam Ĉinujo havas grandan potencialon en la Esperanto-movado. Ĉi-jare estas vico de Ĉinujo por organizi la 28-an Komunan Seminarion, do mi esperas ke tio estos bona stimulo por ĉinaj aktivaj junuloj, kaj ke ili daŭre partoprenos kaj kontribuos ankaŭ en sekvaj seminarioj, por ke Komuna Seminario estu vere "komuna" en ĉiuj sencoj.

En la mondon venis nova sento... Aliĝu al la 65-a IJK en Liberec'!

Esperanto aperis por ligi, ne dividi. Tion ja scias ĉiuj ni ekde la komenco de la lingvo-lernado. Scii tamen ne signifas kompreni. Kompreni ne signifas fari. Komparu la revojn kaj dezirojn kun la movada realeco. Ĝuu batalemon de la pacaj batalantoj, kiuj anstataŭ brakon en brako solidareme marŝi antaŭen konflikt-eme malhelpas agi unu al la alia. Svarmas ekzemploj. Ne pensu, ke nur loke. Ankaŭ ne opiniu, ke tio ĉio nur ekster la junulara movado. Anstataŭ helpo antaŭjuĝoj, primokoj, kritikemo...

Sed ekzistas aliaj ekzemploj. Feliĉe, ĉar kia arbo tiaj fruktoj. Unu el inter ili ligiĝas kun la 65-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en la ĉeĥa urbo Liberec'. Jes, klare. Okazigo de la IJK ne sonas eksterordinare. Ja ĉiu-jare, almenaŭ dum la lastaj jardekoj, por semajno ĝi fariĝas la plej granda internacia renkontiĝeblo de la junularo esperantista. Kio nova do, ke mi deziras prezenti ĝin kiel alispecan ekzemplon? La nomo "Liberec'" aperas ankaŭ kiel kongresatemo: Libereco en ĉiuj formoj. Unu el ili, vere esperantista libereco estas, ke la unuan fojon organizos la kongreson ne nur ia landa teamo helpe de TEJO, sed brakon en brako la Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj! Gejunuloj el tri najbaraj landoj decidis kune realigi ian esperantistan revon, prezenti, ke spite al ĉio tamen eblas! Esperdona ekzemplo por ni ĉiuj. Por la movado precipe. Jes, por nia movado antaŭ ĉio, mi pensas.

La urbo Liberec situas 100 km norde de Prago, meze de la malnova kontinento,

apud la ĉeĥa-germana-pola landlimoj. Pli trafan lokon, ke tiel ĝi estu opurtuna por la oriento kaj okcidento, malfacilas trovi. Ĉiuj sub unu tegmento en studenta domo kun terasoj, tujapude granda lago, en la ĉirkaŭaĵo bela montaro. La kondiĉoj por fari ion eksterordinaran preskaŭ idealas. Preskaŭ, ĉar la sukceso dependas ne nur de la organiza teamo, kia ajn genia ĝi estus, sed ankaŭ de vi, de la partoprenant(in)o. Krome, jam ne unu-foje ja tio okazis, en flamo naskiĝas io nova por ke en flamo ĝi bruliĝu. Ĵetu ĉion do, se nur eblas, venu helpi, kontribui por ke ni kune festu la komencon de io nova. Problemo de la kuraĝa eksperimento estas simpla. La unuan fojon oni orga-nizas IJK-on tiel internacie, nur pere de la reto. Ne kredu, ke ne aperos fuŝaĵoj. Simple venu por helpi, en la bezono solidareme aperi ĉe viaj geamikoj, kiuj flame prenis sur sin la respondecan organizon laboron. Ne lasu ilin solaj!

Multe oni povas paroli pri Esperanto, pri la movado, pri la atingoj de la lingvo. Paroli ĉiam facilas. Anstataŭ tio ni komencu ion konstrui. Krei la realecon de nia Esperantujo alian ol la nunan. Pli noblan, pli esperdonan. Vekiĝu junular'! Aliĝu al la 65-a IJK. Estu kune kun ni en la alia ekzemplo de la internacia agado, ĉu la suno regos aŭ la pluvo! Temp' jam está!

La dua aliĝperiodo daŭras ĝis la 30-a de aprilo: tejo.org/ijk. Tuj simple aliĝu! Detalojn pri la kongreso vi trovos ankaŭ en la Vikipedio en Esperanto: eo.wikipedia.org/wiki/IJK_2009

PS. La IJK malfermas liston de similaj junularaj eksperimentoj en ĉi-jubilea jaro de 150-a datreveno de la naskiĝo de la majstro. La 65-an IJK-on sekvos la 94-a UK kun ankaŭ alia ol ĝis nun Junulara Programo, kaj novjare JES, kuna

entrepreno de la IS- kaj AS-organizantoj. Estu proksime de la eventoj. Ĉeestu ilin kaj helpu, por ke la vortoj fariĝu karno!

Irek Bobrzak

Raporto pri la pasinta IJK en Hungarujo

Unue necesas diri, ke mi ĉiam kun plezuro skribis raportaĵojn pri esperantaj aranĝoj, kiujn mi partoprenis. Estas tiel relative stranga situacio, ke mi ne skribis por Ĉeĥa Esperanto-Junularo la raportaĵon tuj post la aranĝo. Ŝajne tiam mankis tempo kaj mi tuj post IJK havis aliajn aranĝojn. Kiam mi legis en la lasta numero de TEJO Tutmonde, ke ankoraŭ ne estas iu raportaĵo pri IJK en Szombathely, mi decidis skribi kaj reveni en miaj rememoroj en la someron, al la IJK.

Do, kie komenci? Verŝajne en la tempo post la Nova jaro, kiam mia amiko Marek Blahuš konvinkis min, ke IJK estas vere vizitinda aranĝo dum somero. Mi volis eĉ partopreni UK-on en Roterdamo, sed miaj gepatroj ne permesis tion. Mi aliĝis kiel ĉionmanĝonto kaj dormonto en amasloĝejo.

Pasis la tempo, en la fino de junio mi renkontiĝis en Zagrebo kun Tina Tišljár kaj Kaja Farsky, pri kiuj mi sciis, ke ni renkontiĝos denove dum IJK. IJK estis por mi vera plezuro, ĉar tiam mi post duonjaro povis denove renkontiĝi kun miaj geamikoj, kvankam kelkajn mi ja renkontis ankaŭ diversokaze dum tiu duonjaro.

Finfine venis la tago, la 26a de julio, kiam mi enbusiĝis kaj veturis per buso de

Student Agency en Hungarujon. Kun mi veturis jam de Prago ankaŭ Bárá Závodská kaj Petr Adam Dohnálek kaj post ne tro longa vojaĝo ni estis en Hungarujo. Bedaŭrinde, ni ne povis diskuti en la buso, ĉar ni sidis sur neapudaj seĝoj. En Hungarujo, en Győr, ni elbusiĝis kaj tuj interesiĝis pri la biletoj al Szombathely. Ni iris aĉeti bileton kun rabato por junularo dum semajnfinoj. Ĉar neniu el ni kapablas paroli hungare, ni provis paroli germane. La vendanto bonŝance parolis germane kaj vendis biletojn. Ĉar ni en tiu momento havis ankoraŭ du horojn antaŭ la forveturo de la trajno, ni decidis iomete promeni en la urbo. La urbo Győr estas sufiĉe bela, sed neniu de ni havis fotilon. En bona humoro ĉe la rivero ni tagmanĝis. Ni provis eĉ trovi la stratabuleton de la Esperanto-strato, kiu laŭ interreta mapo troviĝas ie inter busstacidomo kaj trajnstacidomo. Bedaŭrinde ni ne sukcesis kaj ni revenis al la trajnstacio. Finfine venis la trajno, kiu *fakte* veturas el Ĉeĥujo, sed bedaŭrinde la prezoj estas tro altaj por ke ni aĉetu la internacian bileton. Kiam en la trajno venas hungara kontrolisto, mi nur montras la bileton kaj respondas per silentado kaj „hmmm“, ĉar mi ankoraŭ ne lernis hungare diri „dankon“. Ni provas eĉ serĉi aliajn esperantistojn, sed la vagono estas



ŝlosita. Iomete pluvas, alie ni diskutas... Finfine, Szombathely - Sabatejo. Kun ni eltrajniĝas ankaŭ Juraj Procházka el Slovakujo kaj du membroj de la praga grupo E-mentál kune kun sia filo. Kun ili estis ankoraŭ hundino.

Laŭ la instrukcioj ricevitaj rete de la organizantoj ni iras tra la urbo, sed nenie ni vidas iujn sagojn, nur kelkajn afiŝojn pri Kulturlingva festivalo kaj akvobatalo. Strange. Tamen laŭ la plano ni sukcesis trovi la IJK-ejon kaj krom la akceptiĝado ni renkontiĝas tiam kun multe da partoprenantoj, ni kisas nin kaj brakumas...La amasloĝejo estas fakte ĉambroj sen litoj, sed ili ne estas grandaj kaj enhavas ankoraŭ ŝrankojn. Ni rapide organizas,

kie kiu dormos.

Dum la unua vespero ni ludas interkonajn ludojn, dancas tipajn hungarajn dancojn, estas eĉ mallonga konkurso pri tio kiu plej rapide trovos trinkejon. La venkintoj (ankaŭ mi) ricevas unu bieron senpage...Bona komenco, la biero estas bongusta ☺

La programo estis plejparte organizita en la universitato, kiu situas ĉirkaŭ 700 metrojn de junulargastejo.

La unuan nokton mi partoprenis ankoraŭ prelegon pri Transilvanio kaj poste diskuton pri demokratio, sed mi estis jam laca, do mi iris dormi. Mi ne estis la unua homo, kiu iris dormi en nia ĉambro.

Matene vekas nin je la oka horo fajrobrigadistoj per sirenoj. Kun multe da partoprenantoj mi ĉirkaŭ la naŭa horo matenmanĝas. La unuan tutan tagon ni iras ĉiuj al la urbodomo, kie salutas nin eĉ parte en Esperanto la urbestro. Ĉiu lando estas reprezentita per baloneto. Ni ricevis ankaŭ materialon por „kun-urbo-interkona ludo“, ni promenas en urbo kaj provas plenumi ĉiujn taskojn. La ĉefa placo estas tre bela kaj en varma somero estas por ni ege utila la akvofontano.

Programo, prelegoj kaj kursoj

Mi kun scivolo partoprenis la kurson de la hungara lingvo, dank' al kio mi lernis kelkajn vortojn; kaj de la kroata lingvo. Plej interesaj estis por mi prelegoj de Carsten de Germanujo pri ekologio. Ni ege diskutis pri la problemaro de ekologio, unue ĝenerale, poste ĉiun tagon pri unu de la renovigeblaj fontoj (suna energio, energio de vento ktp.). Plaĉis al mi ankaŭ videoj de kelkaj firmaoj, kiuj konstruas sunpanelojn. Unu nokton mi partoprenis ankaŭ diskutrondon pri Eŭropa Unio. Vespere mi kun ĉiuj partoprenantoj ĉiam iris en teatrejon, kie estis prezentaĵoj de dancoj, batal sportoj (ekz. tekvondo, karateo), muzikistoj... Unu vesperon ili invitis al podio ĉiujn unuafojajn partoprenantojn de IJK, la nombro estis alta! Ĉirkaŭ 70 novaj homoj! Ĉi tie estus bone diri, ke mi *povis* partopreni IJKojn en Sarajevo kaj en Zakopane, sed tiam mi ankoraŭ ne estis tiom aktiva en esperanta agado.

Kompreneble, ke la programo enhavis eblecojn por kursoj de dancado kaj aliaj aktivecoj, sed kun miaj geamikoj mi havis ankaŭ propran programon. Unufoje

mi iris kun mia ĉefa amiko kaj lia amikino de Serbujo en la urbon, manĝis glaciaĵon, rigardis la standon pri esperanta unio por hungaroj, aĉetis bildkartojn kaj sendis ilin. Duan fojon mi decidis iri aĉeti ion kun mia amiko al Interspar. Tie ni ankoraŭ renkontiĝis kun du partoprenantoj. Fine ni aĉetis melonon, bieron kaj aliajn dolĉaĵojn. Vespere tiun tagon ni ne iris al la teatrejo, sed invitis al nia ĉambro kelkajn niajn geamikojn kaj ni babilis, trinkis bierojn kaj ludis ludon kun botelo, iu de ni rotaciigis la botelon kaj la botelo montris, kiun li devas manĝigi per melono. Iam mi ricevis eĉ pli da melono, ol mi kapablis havi en mia buŝo ☺

Merkrede mi partoprenis ekskurson al la lago Balatono. Estis bedaŭrinde multe da ĥaoso, la buso estis nehome plenega, sed bonan humoron ni havis post mallonga, sed ege amuza vizito de Tapolca, kie estas subteraj kavernetoj, en kiuj oni povas iri per ŝipetoj, ĉar la kavernoj estas parte inunditaj. La distraĵo estis eĉ pli granda pro tio, ke la ŝipetoj por du aŭ tri homoj havis nur *unu* pagajon. Ĉi tie mi devas mencii la unuan kritikon al hungaraj organizantoj. La vizito de Tapolca estis interesa, certe, sed mi ne atendis, ke ni estos nur unu horon ĉe Balatono, sed ke ni naĝos pli longe. La pli grandan parton de ekskurso ni vizitis vinfaradejon kaj aŭskultis, kiel oni faras la vinon. Aldone al tio, post la tagmanĝo ni ankoraŭ havis la vingustumadon, sed mi trinkis nur senalkoholajn trinkaĵojn. Kvankam ni estis en bona humoro, jes, tamen mi pensis, ke dum la ekskurso ni pli longe estos ĉe Balatono...Sed veras, ke la suno ne estis tro forta kaj ne estis tre varme.



Ekskurso al la Balatono

Tamen mi provis eniri la ŝlimon de Balatono. Lacaj, dormantaj, ni veturis per buso al IJK-ejo. Malgraŭ mia nekonto rilate al Balatono, sume mi havis pozitivajn impresojn.

Vespere mi preferis neformalan programon, do kun ĝojo mi ludis kartludon „Uno!“, iam dancis en la diskejo (fakte en koridoro), spektis filmojn „Matrico“ kaj „Ĉeĥa sonĝo“. Unu vesperon ni tiom longe ludis „Uno!“, ke venis iu gardisto, ŝajne pro tio, ke la universitato devis estis fermita por parto de la nokto. La gardisto ne parolis esperante, nur hungare. Provo de Łukasz de Polujo diri al la gardisto, ke li ne parolas hungare, estis malsukcesa. Ni ĉiuj kompreneble bone sciis, kion volas la gardisto de ni, sed Łukasz ŝajnigis, ke ne. Ni poste ekridegis kaj prenis kartojn al la junulargastejo kaj plu ludis tie en unu ĉambro, ĝis la kvara horo matene.

Ege amuza programo en la teatrejo estis ankaŭ konkurso „Kiu volas iĝi milionulo?“, kiun partoprenis eĉ Marek, sed ni ceteraj ĉeĥoj preferis krei laŭte la sub-

tenon al aliaj partoprenantoj, ekz. al JoMo.

Mi ne scias plu, kiun tagon, sed ŝajne ĵaŭde okazis Kulturlingva festivalo (KLF) en teatrejo, kie la partoprenantoj preparis informbudojn pri siaj landoj. Por tio ni ĉeĥoj kunlaboris kun slovakoj kaj preparis komunan standon. Kvankam ni pensis, ke ni havis preskaŭ nenion, tamen la stando estis sukcesa kaj multaj homoj vizitis ĝin. Pli malfrue venis ankaŭ Marek de la komitatkunsido de TEJO kaj li estis pri ni kontenta. Nia stando *fakte* invitis partoprenantojn al nia IJK en Libereco kaj instruis interesatojn kelkajn frazojn de la ĉeĥa lingvo. La vizitantoj de nia stando povis gustumi ankaŭ kukojn. Dume okazis programo, kiu konsistis interalie de dancoj kaj koncerto de JoMo. Bedaŭrinde, en la KLF-ejo estis iom tro varme. Fine de la KLF ni faris komunan foton de ĉiuj ĉeĥoj (11!) en la IJK kaj poste ankaŭ foton kun niaj geamikoj.

Alia por mi ege interesa punkto, parto de programo, estis la naskiĝtago de TEJO. Gregor HINKER kiel prezidanto donis ege belan paroladon en la teatrejo (la paroladon vi povas legi en iu antaŭa numero de TEJO Tutmonde) kaj kompreneble sekvis tion festado. La organizantoj preparis tri grandajn tortojn en verda koloro kaj kun skribaĵoj “TEJO”. La tortopecoj sufiĉis por ĉiuj partoprenantoj kaj oni povis eĉ manĝi pli ol unu pecon. Ne mankis ankaŭ verda ŝaŭmvino.

Ege amuza estis por mi la sporta tago, marde, kiam ni vizitis senpage la lokan akvoparkon (donaco de la urbestro). En la varma somero ni naĝis, amuziĝis, dancis La Bambon en baseno, ĝuis la akvo-


kirlon... Estis eĉ konkurso pri tio kiu plej rapide manĝos parton de melono, aŭ oni povis ludi badmintonon aŭ flugpilkon kaj ĉiu, kiu partoprenis, ricevis por tio unu poenton.

Vendrede ni vizitis akvoparkon denove, sed ankoraŭ antaŭ tio ni provis akvobatale venki super fajrobrigadistoj, sed la fluo de ilia akvo estis tro forta kaj ni kun niaj akvopistoloj tro malfortaj.

Vendrede, la lastan vesperon, en la teatrejo, oni premiis ĉiujn, kiuj partoprenis la sportkonkurson. Venis eĉ por mallonga momento Carsten de Germanujo, kiu ĉiam vespere prelegis novaĵojn – ĉi-foje tamen, bedaŭrinde, lia okulo estis vundita post la batalo kun fajrobrigadistoj kaj li estis kun ĝi en hospitalo. Okazis

ankaŭ fotado de ĉiuj restintaj partoprenantoj.

Dum la IJK mi ekkonis persone multe da homoj, pri kiuj antaŭe rakontis al mi Marek, sed kun kiuj mi pro tio, ke mi antaŭ IJK neniam partoprenis la IS-on, ankoraŭ neniam renkontiĝis. IJK estis bona momento por partoprenantoj de AS kaj IS, ĉar IJK estas unu granda aranĝo kaj en la sama tempo ne estas alia grava aranĝo, ne kiel dum novjaraj renkontiĝoj. Tio estas granda avantaĝo de IJK kaj ĉi tiel mi aliĝas al la opinio de la sennoma kontribuinto el la lasta numero. Estas kompreneble bone, ke estas du aŭ pli aranĝoj en la sama tempo, sed bedaŭrinde, AS estas pli orienta kaj pli spontane organizata kaj dum la lasta AS estis tie eĉ



Kelkaj IJK-partoprenantoj en la kongresa urbo Szombathely

partoprenantoj, kiuj ne parolis esperante bone, aŭ tute ne. IS estas okcidenta kaj pli profesieca, sed simple du aranĝoj estas en la sama tempo. Tamen kaj okcidentanoj kaj orientanoj *kunlaboros* dum la sekva IJK en Ĉeĥujo.

La lastan nokton mi tute ne dormis, ĉar mi sentis bezonon esti ĝis la lasta momento kun unu knabino kaj adiaŭi ŝin. Ĉar mi laŭ la plano estis forveturonta matene per la trajno al Győr, mi decidis diri adiaŭ al partoprenantoj, kiuj ankoraŭ ne dormis. Jam pli frue mi transdonis miajn donacojn al kelkaj miaj amikoj (lumdiskojn kun fotoj, bierojn, ĉokoladojn), tiam mi ankoraŭ devis paki miajn pakajojn kaj kontroli, ĉu ankaŭ Marek BLAHUŠ estas preta. Li estis, kaj malkiel mi kaj Dan MRÁZEK li eĉ dume dormis iomete. Dan poste iris kun ni ankoraŭ al la stacidomo kaj adiaŭis nin. Kun unu trajnŝanĝo ni veturis al Győr, iomete dormis... Poste Marek iris rigardi la urbon Győr kaj sukcesis trovi la tabuleton de la Esperanta strato; mi atendis en la stacidomo kaj gardis niajn pakajojn. Je la dekunua horo venis la buso de *Student Agency* kaj ni jam en pli granda komforto veturis al Brno, hejmen.

Do, kion diri, aldoni ankoraŭ? Eble tion, ke la IJK plaĉis al mi multege, mi ĝuis ĉion, amuziĝis kaj feliĉa mi estas, ke mi partoprenis ĝin. Sekvan IJK-n mi ankaŭ partoprenos, kaj ja eĉ helpos organizi. Mi jam estis en Libereco, kaj ĝi estas ege bela urbo!

Pozitivaj impresoj:

- Mia unua IJK (!)
- Amuza programo, du vizitoj de akvo-parko
- Bona trafikonekto
- La unuan fojon mi vizitis Hungarujon

kaj Balatonon

- Prelegoj de Karsten pri ekologio
- Amuzegega festado de naskiĝtago de TEJO
- Novaj amikoj ktp...
- Venis homoj de ASo kaj de ISO
- Bona listo de ligiloj al retpaĝaroj kun fotoj
- Mi lernis iomete de la hungara lingvo
- Bona kaj facila aliĝilo

Negativaj impresoj:

- Malbone organizitaj ekskursoj, ĥaoso
- Dum la unuaj tagoj mankis la interret-servo, poste en junulargastejo nur kvar komputiloj kun malrapida interreto, fine ankaŭ en la universitatabiblioteko, sed nur antaŭtagmeze.
- Multe da homoj dum la kurso de la hungara lingvo – povus esti du kursoj por tiom da homoj.
- Neniuj sagoj por indiko la vojon de trajnstacidomo al IJK-ejo je la alven-tago
- Malfrue nokte gardisto de universitato ne iris kun iu loka organizanto, ĉar li ne parolis Esperante.
- La fotado de partoprenantoj je la lasta vespero (kelkaj homoj jam estis forveturintaj kaj do ne estis tie)
- Ankoraŭ nenie mi trovis la oficialan foton de ĉiuj partoprenantoj el la lasta vespero.
- Tro fortaj fajrobrigadistoj

Jen ĉio. Mi sendas miajn dankojn al Ludoviko Zamenhofo, al la hungaraj organizintoj, al la firmao *Student Agency* por la veturo en Hungarujon, la loka urbestro...

Miropiro (Miroslav Hruška), juna esperantisto de Ĉeĥujo

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Militärstrasse 14, 8004 Zürich, Svisujo
Retadreso: anna-laura@tejo.org

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5, Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon havi blogon ĉe tejo.org
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JES! IS kaj AS finfine kune!

27.12.2009 – 3.1.2010, Zakopane, Polujo

Ago-Semajno kaj Internacia Seminario finfine kuniĝas – tiun informon dum novjara nokto ricevis partoprenantoj de ambaŭ junularaj aranĝoj. Anonco pri kreo de Junulara E-Semajno estis publikigita filme (filmo.jes.pej.pl) duonhoron post noktomezo. La unua JES okazos en Zakopane (Polujo). La JES-paĝaro (jes.pej.pl) estas ankoraŭ konstruata, do plej multaj informoj pri la nova aranĝo troviĝas en Vikipedio (eo.wikipedia.org/wiki/Junulara_E-Semajno).

La estraroj de la Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj kune publikigis oficialan komunikon pri la temo:

Kunigo de IS kaj AS, ĉi-jare en Zakopane – JES!

La silvestro de 2009 vidos kunigon de IS kaj AS, du fortaj kaj sukcesaj eventoj kiuj ĝis nun konkurencis.

Ĝi okazos en Zakopane, nomiĝos *Junulara E-Semajno* kaj gvidos ĝin teamo de kvar spertuloj de ambaŭ pasintaj eventoj:

- Julia Hell (prezidantino de GEJ)

- Łukasz Żebrowski (prezidanto de PEJ)
- Rolf Fantom (estrarano de GEJ por renkontiĝoj)
- Irek Bobrzak (ĉefo de Varsovia Vento)

Dum la aŭtuno de 2008, PEJ- kaj GEJ-estraroj aprobis la planon, kaj dum renkontiĝo en Berlino subskribis kontrakton por klarigi la celojn kaj gravajn punktojn de la projekto. La projekton aprobis la GEJ-jarĉefkunveno dum la IS en Biedenkopf, post detala pridiskuto kaj esploro de la projekto.

Kompreneble nia celo estas kunigi la plej bonajn flankojn de ambaŭ eventoj, fini la dividon inter IS- kaj AS-partoprenantoj, kaj kunigi la fortojn de organizantoj kies fortoj prefere estu uzataj por varbi novulojn anstataŭ por trakti problemojn kaŭzitajn de konkurenco.

La Internacia Seminario kaj Ago-Semajno pluvivos en la JES, june, kune kaj eĉ pli forte!

La menciita kontrakto troviĝas kiel PDF-dosiero ĉe esperanto.de/dej/asocio/dokumentoj/jes-kontrakto-2008-10-26.pdf

TEJO-aktuale

TEJO-aktuale (TA) estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĉiu povas aboni ĝin senpage. Ĝi aperas sufiĉe ofte kaj enhavas nur koncizajn, konkretajn informojn pri la junulara Esperanto-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. Se vi havas iun interesan novaĵon kaj volas, ke ĝi aperu en TA, sendu ĝin al tejo-aktuale@tejo.org. Ekzistas multe da paperaj revuoj, el kiuj oni povas ĉerpi diversajn informojn. Sed ofte okazas tiel, ke novaĵoj aperas lastminute kaj necesas ke aliaj homoj estu rapide informitaj pri ili.

Paperaj eldonoj en tiaj kazoj ne helpas, ĉar ili tro malrapidas. Pro tio TEJO decidis krei ankoraŭ unu servon, pere de kiu ĉiuj novaĵoj povu rapide atingi siajn celojn.

Retpaĝo de TEJO-aktuale: tejo.org/ta
Redaktistino: Julia NOE, Germanujo,
tejo-aktuale@tejo.org

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

Limdatoj por kontribuoj: 1a kaj 3a dimanĉo en la monato

Retpoŝta abono: uea.org/retlistoj